# kontakto

tutmonda
esperantista
junulara
organizo

N-ro 4
Volumo 3/1966

# kontakto

**N-ro 4**
**Volumo 3/1966**

**Revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (Junulara Sekcio de UEA)**

*Unu el la plej malnovaj diskriminacioj estas la rasa. Ĝi ja estas preskaŭ tiel malnova kiel la historie konata homaro. Estas interese esplori la rasojn laŭ origino, karaktero, diferenco ktp.. Sed estas nekomprenebIe por prudente pensanta homo, kial li diskriminaciu anon de alia raso.*

*Ĉar diferencoj ekzistas same inter homoj de la propra raso, nur pri tio oni nur malofte konscias, kvankam tiuj diferencoj povas esti tre ekstremaj.*

*Fakte ŝajnas esti tiel, ke la raso-diskriminacion ne estigas tiom la videblaj diferencoj, koloraj, aspektaj, vivmanieraj ktp., sed en multe pli alta grado tute aliaj faktoroj, kiel religio, regemo, politiko, ekonomio k.a.*

*Oni povus aldoni alian argumenton, kiu por la kompreno de la problemo estas tre grava, sed kiel senkulpigo estas same senvalora kiom ofte oni uzas ĝis: tradicio kaj historio. Anstaŭ lerni el la historio, oni prenas ĝin kiel pretekston por lasi aŭ konservi ĉion kiel nun estas. Aŭ oni eĉ akrigas la situacion, ĉar la historia evoluo kondukis tiel. Plej bona ekzemplo estas la antisemitismo de la Germanujo inter 1933 kaj 1945, kie la nazianoj apenaŭ estus povintaj tiel terure entrepreni la "finsolvon de la judoproblemo", se ne jam jarcentojn antaŭe tiu antisemitismo kreskus kaj kreskus ĝis la eksplodo per la rasgigantoj de la "tria regno".*

*Cetere, tiam la eksterlando pekis, ĉar ĝi faris tro malmulte kontraŭ tiuj ekscesoj. Ni zorgu, ke ni ne faru la samajn pekojn hodiaŭ!* *Stef*

Redaktoro: Stefan Maul, Hubertusstr. 2a, 625 Limburg/Lahn, Germanio - Desegnisto: Jan Schaap: Administrejo, al kiu oni sendu wiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.: Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando - Prezo: 8 ned. gld. = 32 steloj (jarabono de minimume kvar numeroj); 2.20 ned. gld. = 9 steloj (individua numero) - Bankisto de UEA: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando - Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, tel. (010) 25 66 45 - Reklamtarifo: La redakcio liveros kontraŭ peto. Speciala malalta tarifo por esperantistaj entreprenoj.

La fondaĵo junulara gazeto estas oficiale fondaĵo de UEA kaj ĝia celo estas subteni la gazeton de TEJO dum la frua periodo de ĝia eldonado. Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ estraranoj de TEJO.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra marĝeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Ii havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikolo respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO respektive de la redakcio.

**ENHAVO**

| | |
|---|---|
| La nevidebla geto | 3 |
| Martin Luther King | 4 |
| Havaja raso — aparta raso | 6 |
| Ili parolas 38 lingvojn | 10 |
| Verwoerd mortis — Apartheid vivas | 12/13 |
| Amas-rasismo | 14 |
| Niaj humoristoj: Ruben Feldman Gonzáles | 15 |
| Senpaga instruado | 16 |
| Mozaiko | 18 |

**NIAJ KONTRIBUINTOJ**

La historion de la negroj en Usono priskribas eŭropa fakĵurnalisto; la artikolo estas tradukita el la germana. — La raporteton de Martin L. King ni prenis el libro, en kiu estas kolektitaj infanmemoroj de eminentuloj. — La bildraporton pri Havajo liveris al ni US-artikolservo, sama la raporton pri la UN-lernejo. — La artikolon pri Sudafriko verkis la redaktoro surbaze de gazetar-materialo. — Mefi(s)tofilo estas anonima aŭtoro, kiu dum kelka tempo aperigis strangan serion en "pozitive", organo de GEJ. — Ruben Feldman Gonzáles estas jam konata al niaj legantoj. — La artikoleton "Senpaga instruado" kompilis la redaktoro.

**FOTOJ**

Ĉiuj fotoj venas de US-artikolservo; la kliŝon por paĝo 4 disponigis DER SONNTAG.

# La nevidebla geto

**Historio de la negroj en Usono**

**La hodiaŭajn rasoproblemojn en Usono oni nur povas ĝuste kompreni, se oni konas ankaŭ la historion, kiu staras malantaŭ tiuj problemoj. Tial ŝajnas al ni grave, almenaŭ skizi la historion de la negroj resp. de la "afro-amerikanoj" — ĉa. 19 milionoj de entuta loĝantaro de 180 milionoj (nombroj de 1960) — kiuj devas vivi en la usona socio en nevidebla sed daŭra geto.**

La prapatroj de la hodiaŭ en Usono vivantaj negroj venis per la sklavkomerco, komencita per la portugaloj kaj hispanoj, daŭrigita per nederlandanoj kaj angloj, ekde la komenco de la 16a jarcento en la "novan mondon", kiel malmultekostaj laboristoj. En Ameriko tiam la sistemo de la sklaveco en la diversaj kolonioj kaj regionoj evoluis laŭ diversaj gradoj de terureco. Plej abomenindaj estis la cirkonstancoj sur la britaj Okcidenthindaj Insuloj kaj la sudaj britaj kolonioj en Nordameriko, la sudŝtatoj de la hodiaŭa Usono.
La sklavoj restis ekster ĉia jurkomuno, ja oni agnoskis ilin eĉ ne homoj. Nur je la tempo de la klerigo okazis individuaj liberigoj de menciinda nombro, kaj kutime estis durasuloj, kiujn generis la blankaj plantej-posedantoj kun siaj multnombraj negraj konkubinoj.

**La kvakera impulso**

Plej frue kaj energie la kvakeroj turnis sin for de sklaveco, unue unuopuloj, poste la plimulto de la religi-komunumo. Tiel ĝis la fino de la 18a jarcento en la de ili fondita kaj poste ankoraŭ influita Pensilvanio kolektiĝis relative forta grupo de liberaj negroj, precipe en la ĉefurbo Filadelfia. Pluaj (relativaj) centroj estis Bostono kaj Novjorko. De tiuj lokoj surbaze de la kvakera impulso eliris la unuaj iniciatoj por memstareco de liberaj neblankuloj.

En 1787 en Filadelfia grupo sub gvidado de Richard Allen kaj Absalom Jones, apogite per kvakeroj, fondis la "Free African Society", proteste kontraŭ la komenciĝanta apartigo en metodista eklezio de Filadelfia. El la "Free African Society" en 1794 estiĝis la du unauj signifaj kaj sendependaj negro-eklezioj sub Allen unflanke kaj Jones aliflanke.

La historie pli signifa estis tiu sub Allen, Bethel Church, ĉar ĝi formis en 1816 kun pluraj similaj eklezioj la "African Methodist Episcopal Church" (AME). Simile estiĝis en Novjorko la "African Methodist Episcopal Zion Church" (AMEZ); tiuj du eklezioj estis la plej gravaj sendependaj negro-eklezioj en Usono, kaj estas interese, ke hodiaŭ ekzistas klopodoj unuigi ilin, kun pluraj pli malgrandaj eklezioj eĉ. La eklezioj kiel unua organizacio de liberaj negroj liveris ankaŭ la unuajn inteligentulojn kaj militemajn propagandistojn de la usona negraro: pastroj kaj episkopoj.

En la sama jaro 1787 Prince Hall en Bostono fondis la unuan sendependan negran frimasonan loĝion, kiu longan tempon ludis la plej gravan rolon, apud la eklezioj, en la kultura kaj sociala vivo de la negroj. Fine la saman jaron Hall direktis peticion al la parlamento de Massachusetts, pledante por samaj instruŝancoj por negroj — tiam por du jarcentoj vane.

**Politika aktiveco**

La unuan politikan aktiviĝon de la liberaj negroj provokis planoj de 1816 fondita "American Colonization Society", kiu intencis — por "savi" la sklavecon en la sudo — transporti la liberajn negrojn al Afriko kaj loĝigi ilin en la hodiaŭa Liberio.

Laŭ iniciato de Richard Allen jam en januaro 1817 en Filadelfia okazis unua protestkunveno. Sed nur la konstanta protestado de la negroj stimulis la abol-movadon, la movadon por forigi la sklavecon. Kvankam ĝi ĉefe estis finacita kaj portita per liberalaj blankuloj el la nordo, tamen la negroj havis pli grandan kaj aktivan influon ol ni kutime opinias. Kun propraj revuoj, la arda pamfleto de David Walker (1928), kun oratoroj kaj publicistoj kiel Frederick Douglas (forkurinta sklavo) kaj Henry H. Garnet, pastro, ili havis grandan parton de plej efikaj kontribuoj. Ankaŭ en la post 1830 komencanta "Underground Railroad", fuĝhelp-movado por sklavoj el la sudo, la negroj tre aktivis. Intertempe la du grandaj sklavo-konspiroj (1800 kaj 1822) kaj la revoluci-eksperimento en Virginia de Nat Turner (1831) kontribuis al malsekuriĝo de la sudo kaj vekiĝo de la nordo, ĉar ili draste demontris la neeblecon teni la sklavosistemon.

Reage al la komencanta propagando de la abolistoj en la nordo la sudo nur des pli obstiniĝis en sia defendado de la sklaveco.

Blankuloj nekonformaj, kiel la kvakeroj, aŭ estis forpelitaj, cedis norden aŭ rezignaciis. La leĝoj por subpremi la negrojn estis severigitaj, la sudo vivis en konstanta kvazaŭ-totalitara situacio. Por pravigi sin oni evoluigis kaj sistemigis ekde 1835 la doktrinon



Martin Luther King ricevanta la Nobel-premion

*Ofte oni demandis min pri mia vojo al neperforteco. Se mi volas respondi ĉi tiun demandon, mi devas reiri ĝis miaj infanaj jaroj, kiam mi ankoraŭ vivis kun miaj gepatroj en Atlanta. Jam tiam la "segregation (apartigo) estis abomeninda por mi, kaj mi estis terurigita pro la kruelaĵoj, kiujn ĝi portis kun si. Mi konis lokojn, kie oni brutale linĉis negrojn, kaj kelkan noktan veturon de l' Ku-Klux-Klan mi travivis. Proprokule mi vidis, kiel brutale agadis la polico kaj per kia konsternega maljusteco la tribunaloj traktis negrojn. Ĉio ĉi influis mian internan evoluon. Preskaŭ kondukis al tio, ke mi malamus ĉiujn blankulojn.*
*Mi memoras, ke iun tagon mia patro iris kun mi en ŝuvendejon en la komerca kvartalo de la urbo. Ni eksidis sur la unuaj neokupitaj seĝoj antaŭe en la vendejo, kiam juna blanka dungito venis al ni. "Mi volonte servos vin", li murmuris afable, "sed bonvolu do iri tien al la malantaŭaj lokoj."*
*"Ni ne estas malkontentaj pri la lokoj ĉi tie," diris mia patro. "Ni sidas ĉi tie tre komforte."*
*"Mi bedaŭras," diris la vendisto, "sed ĉi tie mi ne povas servi vin."*
*"Nu, aŭ ni aĉetas niajn ŝuojn ĉi tie, kie ni sidas, aŭ ni tute ne aĉetas," respondis mia patro. Tiam li prenis mian manon kaj eliris kun mi. Estis la unuan fojon, ke mi vidis mian patron tiel furioza. Mi ankoraŭ aŭdas lin monologi: "Neniam mi agnoskos tiun sistemon, indiferente kiel longe mi devas vivi sub ĝi."*
*Kaj li ankaŭ neniam faris. Alian fojon, kiam mi sidis kun li en la aŭto, li pretervidis halt-ŝildon. Polcisto haltigis lin kaj diris: "Nu, boy, montru vian konduk-permeson."*
*"Mi ne estas boy!" indignite vokis mia patro kaj montris al mi "jen estas boy! Mi estas viro, kaj tiel longe kiel vi ne alparolas min kiel tian, mi ne aŭskultas vin!" La policisto estis tiel konfuzita, ke nervozhaste li plenigis la punslipon kaj forlasis la scenejon laŭeble rapide.*
*Mi ankaŭ spertis, ke rasa maljusteco ne estas apartigebla de ekonomia maljusteco. Kvankam mi mem venis el ekonomie sekura hejmo kun eĉ certa komforto, neniam mi povis forgesi la teruran malriĉecon ĉirkaŭ mi kaj la ekonomian malsekurecon, en kiu vivis la familioj de miaj ludkamaradoj. Kiam mi estis 17jara kontraŭ la volo de mia patro mi laboris dum du someroj sur plantejo, kiu okupis blankulojn kaj negrojn. Tie mi vidis plej proksime, kiel oni eluzis la malriĉan blankulon same kiel la negron. Per tiuj spertoj tre frue mi konsciiĝis, kiom da maljusteco ekzistas en nia socio.*
*Tiel mia intereso pri rasa kaj ekonomia juroj estis jam relative granda, kiam en 1944 mi ekstudis en Morehouse College. Tie mi legis"Eseo pri Civila Malobeo" de Thoreau. La ideo, ke oni rifuzu kunlabori kun malbona sistemo, tiel fascinis min, ke plurfoje mi legis la verkon. Tiel la unuan fojon mi okupiĝis pri la teorio de neperforta rezisto.*

*Martin Luther King*

de la ĉiama malplivaloro de la koloraj rasoj entute kaj de la negroj kaj afrikanoj aparte. Kontraŭ tiu rasismo la koncernitoj batalis per spiritaj rimedoj, kiom nur eblis. Tiu rasismo, kiu dum la meza 19-a jarcento etendiĝis ankaŭ al Eŭropo, ankoraŭ hodiaŭ efikas.

**La milito**

En 1787, kiam estiĝis la usona konstitucio, ŝajnis ke la sklavosistemo jam agoniis, sed tiam la rapida disvastiĝo de la kotonplantado ĉa. 1800 alportis konsiderindan ekspansion de la sklaveco, kiu nun ankoraŭ pli multe ol antaŭe profitigis por la plantejposedantoj. La plimulto el la nordo ja ne estis por nuligo de la sklavosistemo, sed — ankaŭ pro ekonimiaj interesoj — kontraŭis ĝian plian kreskon. El tiuj internaj krizoj, kiujn la abolistoj kun sia agitado por tuja nuligo ankoraŭ akrigis, fine en 1861 estiĝis la usona interna milito.

Kun malmultaj voĉoj Abraham Lincoln, la kandidato de la nove fondita republikana partio, en 1860 estis elektita prezidanto, tute ne, laŭ la publika opinio de la nordo, por tuŝi la sklavecon. Sed la sudo vidis minacojn por sia ĝisnuna hegemonio en la federacio kaj reagis unue per disiĝo, poste per milito. Kontraŭ siaj intencoj Lincoln estis devigita, paŝon post paŝo kaj nur kiel militan rimedon proklami la emancipon. En 1865 la 13a konstitucia suplemento ankrigis la forigon de la sklaveco en la konstitucio.

Ankaŭ post sia malvenko la sudo tute ne estis preta, cedi politikajn, socialajn kaj ekonomiajn rajtojn al "siaj" negroj. Ili nun batalis per politikaj rimedoj.

Dum la du rivalaj grupoj inter la blankuloj, la kvazaŭ-aristokrataj "Bourbons" kaj la "poor white", klopodis por la voĉoj de la negroj, ĉi tiuj havis ankoraŭ certan instrumenton por gardi siajn rajtojn. Sed post la fino de la 19a jarcento la "poor white" sisteme resenrajtigis la negrojn, procedo finita jam en 1910. Paralele oni sistemigis kaj vastigis ankaŭ la socialan apartigon. Kontraŭ ambaŭ la nordo ne agis, unuflanke ĉar la sudo grandparte persvadis la nordon per siaj propagandotezoj, aliflanke ĉar ankaŭ en la nordo nur malmultaj negroj rajtis baloti kaj ankaŭ tie ekzistis neskribitaj aŭ skribe fiksitaj apartigleĝoj.

**La burĝorajta movado**

En tiu malkulmino de ilia politika historio Booker T. Washington eble plej frape reprezentis la rezignacion de la negroj, kun politiko de adaptiĝo al la situacio. Nur komence li estis la vera gvidanto de la usona negraro. Jam en 1902, sep jarojn post lia potenciĝo, viviĝis inter la junaj intelektuloj, studintaj en la intertempe starigitaj negro-universitatoj, rezisto kontraŭ senrajteco, apartigo, kiel kontraŭ la pasiveco de Washington. La plej aktiva inter ili estis W. E. B. Du Bois, mortinta nur en 1963 95jara en Accra, Gano. 1903 li komencis la publicistan batalon kontraŭ Washington. En 1906 kaj 1908 iris ondo da linĉoj (proksimume 100 dum unu jaro !) kaj de blankuloj provokitaj rasokravaloj tra la lando, kio vekis la konsciencojn de blankaj liberaluloj. Ili asociiĝis kun la negraj intelektuloj kaj fondis en 1910 en Novjorko la "National Association for the Advancement for Colored People" (NAACP). Ĉefredaktoro de ilia revuo fariĝis Du Bois, kaj el tiu pozicio li havis fortan kaj efikan influon sur la formiĝantan burĝorajtan movadon.

La 1a mondmilito frontigis la junan organizon tuj kun kromaj problemoj. Ekde 1915 pro diversaj kialoj komenciĝis forta migrado de la negroj el la sudo al la nordo kaj oriento, precipe en la grandajn industriurbojn. Tiam estiĝis la grandaj negraj "getoj" de Novjorko (Harlem), Ĉikago, Detroit, Pittsburgh. Kvankam la industrio ĝojis pri la malmultekostaj laborfortoj, eĉ logis ilin, la resentimentoj de la blankaj laboristoj kaj dungitoj estigis aron da rasokravaloj, kiuj tuj post la milito, en la "ruĝa somero" de 1919, pludaŭris kaj akriĝis. Dum la posta ekonomia malflorado denove la negroj estis la plej trafitaj.

Sur tiu grundo de malespero estiĝis la movado de Marcus Aurelius Garvey, kiu la unuan fojon mobilizis la amasojn kaj donis al ili novan memfidon por superi la tradician, de la blankuloj injekciitan komplekson de malplivaloro. Garvey ja fiaskis kun sia projekto remigri al Afriko ("Back-to-Africa"), nelaste ankaŭ pro la rezisto de la inteligentaj gvidantoj de la negraro, sed lia historia signifo troviĝas ĝuste en la unuafoja mobilizado de la amasoj. Post la malapero de Garvey de la scenejo (1925), la nova militemo grandparte agadis nur sub la surfaco, ekz. en la organizado de propraj sindikatoj sub Philipp A. Randolph, kiu en printempo de 1941 la unuan fojon atingis decidan sukceson, kiam li minacis per "marŝo al Vaŝingtono" kaj prezidanto Roosevelt tre rapide cedis kaj per dekreto kreis pli bonajn laborkondiĉojn por negroj.

**La efiko de la 2a mondmilito**

La duan mondmiliton la negroj masive partoprenis kiel soldatoj. Post sia batalo por demokratio kaj kontraŭ rasismo (de Germanio), ili atendis ankaŭ hejme la finon de la rasismo kaj la komencon de la demokratio por si mem. Sed simile kiel post la unua mondmilito ankaŭ nun estiĝis komence nur ondo da linĉoj en la sudo. Tamen la senlaca laborado de NAACP nun portis la unuajn historie gravajn fruktojn, kiam ĝi atingis per proceso antaŭ la plej supera federaciaa kortumo, ke la apartigo en la lernejoj estis deklarita kontraŭkonstitucia (1954).


Unu jaron poste komenciĝis en Montgomery, Alabamo, la spontana omnibuso-striko de la negra loĝantaro proteste kontraŭ la apartigo, kaj estis tiu bojkoto, de kie Martin Luther King leviĝis kiel hodiaŭ plej eminenta gvidanto de la usona negraro. Ĉirkaŭ li kolektiĝis la nova organizo ("Southern Christian Leadership"), kiu intertempe etendiĝis ankaŭ al la nordo. Studentaj kaj aliaj grupoj, en kiuj kunlaboras ĉefe junaj koloraj kaj blankaj homoj, portis la grandajn klerigajn kaj protestajn kampanjojn, kiuj iom post iom forigis la apartigajn murojn. Sed la rasistoj de la sudo batalis, per publika aŭ kaŝita teroro, per murdoj kaj incendioj. Ili atakis indiferente ankaŭ preĝejojn.
La eklezioj de la sudo nur hezite malfermas siajn pordojn por la negroj. Efike estis, ke nun ankaŭ la katolika eklezio emfaze kondamnis la rasismon. Profundan impreson faris, ke eĉ katolikaj

monaĥinoj marŝis ĉe la pintoj de demonstracioj.

Ankaŭ kun la novaj leĝoj la batalo por egalaj rajtoj ne estas finita. Eĉ se baldaŭ finiĝus la diskriminacio en la sudo, la nevidebla kaj tial ne kaptebla apartigo en la gigantaj "getoj" de la nordo restas. En ili amasiĝis enorma sociala dinamito, kiu ĉiutempe povas eksplodi — kaj jen kaj jen ja eksplodas.

D-ro Imanuel Geiss

# HAVAJA RASO



**Kiel stultaj estas rasantaŭjuĝoj, eble nenie oni povas tiel okulfrape vidi kiel sur la "paradiza insulo" Havajo. Ne malpli ol 64 diversaj rasmiksiĝoj pravigas la nomigon "kosmopolita socio". La rezulto de ĉi tiu eksterordinara miksiĝo de rasoj, komenciĝinta antaŭ 200 jaroj, estas eksterordinare belaj homoj kaj popolkomuno, kiu malgraŭ ĉiaj diferencoj de rasorigino vivas en nekutima harmonio. Ilia rasa toleremo parte estas ankaŭ heredaĵo de la indiĝenoj, la polinezoj, kiuj antaŭ pli ol mil jaroj ekloĝis sur la insulo.**


**Ankaŭ la kulturo de Havajo respegulas la miksiĝon de rasoj kaj nacioj. Honolulu ekz. prezentas fascinan bildon de azia kulturo, amerika loboremo, pacifika romantiko, apartaj arkitekturo, vestoj, lingvo kaj kuirarto.**

**La nombro de puraj polinezoj daŭre malkreskas. Post du generacioj ili probable estos tute integriĝintaj. Antaŭ 100 jaroj venis multaj azianoj kiel kamplaboristoj. Iliaj nepoj hodiaŭ troviĝas inter ĉiuj sociaj tavoloj. Simile estas ĉe la aliaj popolgrupoj. Sed nun bonvolu rigardi ĉi tiujn fotojn, kaj se vi poste ne estos bone impresita kaj forĵetos ĉian rasantaŭjuĝon, vi estas neinstruebla fanatikulo.**

**1 Marlene Among, lernantino, devenas de havajanoj, portugaloj, ĉinoj, hispanoj kaj koreanoj.**

**2 Lynn Howell, 18jara, estas tiel tipa por Havajo kiel la pejzaĝo en la fono. Ŝi estas la bela produkto de ok rasoj: ĉinoj, angloj, irlandanoj, portugaloj, danoj, skotoj, hispanoj kaj polinezoj.**

**3 Shoyei Yamanchi, piloto, kun siaj japana patro kaj latva patrino.**



2

# APARTA
# RASO



3




4 Tiaj belulinoj ne estas raraĵo sur la stratoj de Honolulu. Susan Molina havas filipin-svedan devenon.

5 Edward Whaley, laboristo, havas irlandajn, ĉinajn kaj polinezajn prapatrojn.

6 Tri generacioj de miksita havaja familio: la geavoj ambaŭflanke, meze la infanoj kaj nepo. Jen la simbolo de havaja proverbo: Maluna O Aupuni A Pau O Ke Ola Ke Kanaka (super ĉiuj popoloj staras la homeco).

4



5



6

# ili parolas 38 lingvojn

**La internacia lernejo de la UN**

Kritika pensado estas afero, kiun la instruistoj de la internacia lernejo de la UN en Novjorko postulas kaj akcelas. La lernantoj ekkonu, ke "faktoj" ne davas esti prijuĝataj unuflanke, sed havas plurajn aspektojn kaj signifojn.

Surbaze de tiu ekkono kaj pro la memkomprenebleco, laŭ kiu la lernantoj estas pretaj sin reciproke akcepti, frue vekiĝas la komprenemo por komunaĵoj, kiuj pli forte kunligas ol samaj raso, haŭtkoloro, religio aŭ nacio.


La internacia lernejo de UN, fondita en 1947 kiel infanĝardeno, intertempe estas kompleta lernejo kun elementa, meza kaj alta ŝtupoj, kiu lasta kondukas al universitato.

Momente vizitas ĝin 570 lernantoj el 59 landoj, parolantaj entute 38 diversajn lingvojn. La plimulto estas gefiloj de UN-reprezentantoj kaj UN-oficistoj.

La diferenca deveno kaj la bunta multeco de la instruprogramo donas al la lernantoj la okazon ekkoni kaj respekti morojn, kutimojn kaj pensmanierojn de alilandanoj. La lernejo klopodas konservi ĉi tiun variecon kaj tute ne strebas gvidi la instruadon laŭ ĝenerala linio.

Por majstri la pedagogiajn malfacilaĵojn, oni limigas la klasojn je maksimume 20 lernantoj. La uzataj lingvoj estas sur la unua ŝtupo nur angla kaj franca. Lernantoj, kiuj regas neniun el ambaŭ, devas lerni la anglan en fulmkursoj. Krome oni instruas en araba, hindi-a, urdua, ĉina kaj aliaj lingvoj, por ke la koncernaj infanoj ne forgesu sian gepatran lingvon. Sur la meza ŝtupo oni komencas trian lingvon kaj in-





*Dum la patroj de tiuj knaboj penas en la UN-kunsidoj superi diferencojn kaj malfacilaĵojn, ŝajnas ke por la filoj ne ekzistas tiaj malfacilaĵoj.*



tensigas la kutimajn fakojn. Dum la lastaj tri jaroj, sur la tria ŝtupo, oni pretigas la lernantojn por la transiro al usona aŭ eksterlanda altlernejo.

Kiel apenaŭ iu lernejo ĝi estas — pro la intima ligiteco al UN — predestinita por evoluigo kaj elprovado de internaciaj eduk- kaj instru-programoj. Tial UN ankaŭ subtenas ĝin per 10 % de la kostoj.


Mirigi nur devas, ke en tia lernejo tute ne ekzistas la eblecо lerni aŭ uzi esperanton. Kie ĝi pli multe taŭgus ol ĝuste tie, en la internacia lernejo de UN?



▶



*Biologi-leciono en angla kaj franca lingvoj. Ĉiam oni kunigas lernantojn el diversaj nacioj. En ĉi tiu klaso ekz. la instruisto estas aŭstraliano, la lernantoj belgo, skandinavo, ĉino, usonano.*



*Infanoj instruas infanojn. En ĉi tiu lernejo oni jam tre proksimiĝis al la idealo de la mondo: reciproka helpo, portita de fido, amikeco kaj respekto; kunlaboro sen atenti haŭtkoloron, religion, rason aŭ nacion; malamo kaj antaŭjuĝoj estas nekonataj.*

**La murdinto de Verwoerd ne solvis la problemojn en Sudafriko**

**"Kun la beno de la ĉiopovanto ni volas daŭrigi vojon komencitan de nia amiko." Ĉi tiun firman decidon deklaris unu tagon post la murdiĝo de la sudafrika ĉefministro Hendrik Verwoerd la Nacia Partio, kies prezidanto ekde 1958 estis Verwoerd, murdita per ponardo la 6an de septembro 1966 en la parlamentejo de la Sudafrika Unio. Samtempe la parlamentanoj dankis al dio, ke "tiel longe li lasis al Sudafriko Hendrik Verwoerd-on kaj la riĉan heredaĵon, kiun li postlasis."**

▶

**Obstina**

La fama usona humoristo Groucho Marx prefere endanĝerigis sian vivon ol cedi al io ajn.

Foje li transportis sian edzinon, sian ĵus naskitan filineton Mariam kaj flegistinon hejmen. Li kondukis sian amatan Lincoln. Ĝuste sur reltransirejo la aŭto strikis. En tiu momento fajfis proksimiĝanta trajno. Marx rigardis sian horloĝon kaj diris: "La trajno estas akurata ..." "La bebo!" kriis lia edzino. "Rapide eliru!" "Kaj lasi la multekostan aŭton sur la reloj? Mi ne!" vokis Marx. "Trankvile, mi startas." Sed la aŭto ne ekfunkcias. S-rino Marx eliras kun bebo kaj flegistino, ĉar la trajno jam aperas. Nur Marx restas kaj obstine provas starti, per unu okulo observante la proksimiĝantan trajnon. Subite li klinas sin el la fenestro kaj vokas: "Ruth, se io okazus al mi: la ŝlosilo de la kiras-ŝranko estas en la biblioteko malantaŭ la Shakespeare-dramoj!"

Neniu scias, kio okazus, se la trajno pro la proksima stacio ne veturus jam malpli rapide. Tiel kelkajn metrojn antaŭ la strato ĝi haltas grincante.. "Damnite!" grumblas Marx, "nun mi devas trovi alian kaŝlokon por la ŝlosilo."

# Verwoerd mortis - apartheid vivas

Ne mallonge antaŭe, okaze de la 5a jarjubileo de la ekzistado de sendependa sudafrika respubliko, la reprezentanto de alia komuno de la lando, la anglikana dekano de Johannesburg, episkopo G.G. French-Beytagh, demonstracie rifuzis diri dankpreĝon por la respubliko, ĉar laŭ lia opinio la registaro Verwoerd ne plenumas sian taskon en respubliko, servi al la bonfarto de **ĉiuj.**

Tiu du ekstreme malaj sintenoj signas la tension, en kiu vivis Verwoerd, kun kies nomo ĉiam restos ligita la "apartheid"-politiko, lia "riĉa heredaĵo". Kaj ke tiu politiko vivas ankaŭ post lia morto subita, ne devas mirigi. Cetere iel estas tragike, ke Verwoerd ne estis murdita pro tiu politiko kaj ne de negro.

La problemaro ne estas simpla, kaj ankaŭ nia artikolo ne povas komplete klarigi ĉiujn komplikaĵojn, pri kiuj ekzistas jam tuta biblioteko. Ni nur povas doni kelkajn atentigojn, kiuj eble helpos klarigi la demandojn.

### Simpatio ĉe la komerco

La starpunkto de la apartheid lastatempe evidente trovis kelkan simpation en ekonomiaj rondoj. Almenaŭ oni ne plu troe indigniĝas pri ĝi. Certe ne estas la starpunkto de ĉiuj blankuloj — la eklezioj, escepte de la nederlanda-reformita, plurfoje protestis kontraŭ la apartheid-politiko — sed oni ja povas diri, ke inter la blankuloj ne estas eŭropanoj, ankaŭ se oni kelkfoje nomas ilin tiel. Oni ne povas resendi ilin, ne voki "iru hejmen!" ĉar ili jam dum generacioj hejmas en Sudafriko. La unuaj eŭropaj enimgrintoj venis en preskaŭ neloĝatan landon, ili ne fortrudis afrikanojn, por tiel nomi la nigran loĝantaron. Ankaŭ pli poste milit-bataloj estiĝis nur, kiam la disvastiĝantaj blankuloj kaj la land-serĉantaj afrikanoj el la nordo renkontiĝis.

### Religia influo

La "idealo" de rasapartigo ne ekzistis dekomence en Sudafriko. La multnombraj durasuloj de la kap-kolonio estas pruvo por tio. Sed oni ne subtaksu la influon de religiaj konvinkoj de la enmigrintoj en la evoluo al la nuna situacio. Tio validas precipe por la enmigrintaj "buroj". Pleje ili estis membroj de la kalviniste reformita nederlanda eklezio. Ili derivis la rasajn diferencojn el dia providenco. Certe la "elektita" blanka buro-popolo havis ankaŭ misian kaj civilizan taskon, ĉar ankaŭ al nekristanaj negroj oni devis prediki la evangelion. Sed tio ne nuligis la diferencojn. Rezulto estis la fondado de multaj "eklezioj bantustanoj". La zorgo por la pureco de la blanka raso ŝajnis ordonita de kristana konvinkiĝo. Eĉ hodiaŭ oni ankoraŭ povas trovi bibliajn argumentadojn, ke **rasmiksiĝo estas frivolaĵo kontraŭ la dia volo:** Dio ja volis spiritan unuecon de ĉiuj kristanoj, sed en la videbla homa realeco li deziras ekzistadon de diferencaj rasoj kaj popoloj! Estas tasko de ĉiu popolo, fariĝi kaj esti **ĝi mem.** Volonte tial hodiaŭ reformitaj teologoj postulas la evoluon de la afrikanoj al popola propreco, ĉe kio la blanka kristano havas patrecan gvid-taskon rilate la kulture postrestinta nigra frato. Nur se oni konsideras ĉi tiujn religiajn konvinkojn, oni povas kompreni la obstinecon, kun kiu oni rajdas sur la ĉevalo apartheid: Oni kredas defendi verajn kristanajn valorojn, kiujn aliaj bedaŭrinde jam forlasis! Certe, ĉiuj aliaj kristanaj eklezioj kontraŭas la apartheid-on, sed ili ja estas minoritato kompare al la nederland-reformita eklezio. Kaj krome ili havas malmultan influon sur la regantajn potencojn.

### Pozitivaj faktoj

La registaro volonte atentigas pri tio, ke la fakta evoluo de la lando ŝajnas pledi por la praveco de la apartheid-politiko. Ne ekzistas lando sur la afrika kontinento, en kiu tiel alta procentaĵo de infanoj vizitas lernejojn kiel en Sudafriko. Dekmiloj da afrikanoj preferas migri el la najbaraj ŝtatoj en la apartheid-landon, por ĉi tie esti multe pli bone pagitaj por sama laboro. Kun prava fiero la ŝtato povas montri al multaj social-faroj, kiujn ĝi grandparte financis per impostoj de la blankuloj por la afrikanoj. Kaj la evoluo de la "bantustanoj", la pure afrikanaj enklavoj, trovis pledantojn ankaŭ inter la afrika loĝantaro mem.

Krome oni certe komprenas, ke la tri milionoj blankuloj kelkfoje sentas veran timon kontraŭ la 12 milionoj negroj. La lastaj revolucietoj en aliaj afrikaj ŝtatoj ne efikis trankvilige. La plimulto de la sudafrikaj blankuloj apenaŭ kredas esti sekuraj, se foje la afrikanoj atingas regpotencon. Ĉar aliflanke estas ja ĝuste la radikalaj fortoj, kiuj postulas la potencon. Kaj tiel oni provas, pro sekuremo, malhelpi tian evoluon por ĉiam.

### Tamen diskriminacio

La registaro dum la jaroj kreis la eblecon, per multnombraj leĝoj garantii sukceson de la apartheid-volo. Serveraj pasportleĝoj permesas precizan kontroladon de la migrantaj laboristoj, kiuj laboras en "blankaj" regionoj. La batalon

kontraŭ la komunista subversivagado, kiun oni supozas ĉie kie la negroj defendis sin kontraŭ arbitraĵoj, ebligas deportado kaj limigo de restadpermesoj, kiun oni ekzemple aplikis ĉe la nobel-premiito Albert Luthuli. Profesiaj karieroj por afrikanoj en "blankaj" regionoj estas limigitaj. Neniam ili atingos gvidan pozicion kun blankaj subuloj. Aldoniĝas la ĉiutagaj aferoj, kiujn oni sentas aparte humiligaj: apartaj kupeoj en vagonaroj, aŭtobusoj, apartigo en gastejoj, hoteloj, necesejoj, longaj vojoj al la laborejoj, ĉar la loĝejoj de la afrikanoj situas longe for de la urbo. Ĉe kiaj ajn eŭfemismoj tio estas diskriminacio. La afrikano ja estas homo kaj bone sentas, kiel oni taksas lin. Sed malmulte li povas fari kontraŭ tio. Ĉu do ne tamen estus pli bone elmigri en la diversajn bantustanojn? Bedaŭrinde tio estas iluzio. Ĉi tiuj landoj dum longa tempo, eble neniam, povos kaj kapablos doni al ĉiuj afrikanoj de Sudafriko ekzistad-eblecojn. La registaro mem konfesas tion admonante la industrion, lokiĝi en la limregionoj inter blankuloj kaj nigruloj, por ke la afrikano povas kvazaŭ tra la servista enirejo atingi sian laborlokon kaj vespere iri hejmen al sia familio. Eĉ se vere estiĝus tiaj industri-zonoj, oni tamen plue ĉie en la "blankaj" regionoj bezonus afrikanajn servistojn kaj lobaristojn. Tiel ĉiam ekzistos politike senrajtaj afrikanoj, apartigitaj de la "riĉaj" blankuloj, sed nemankeblaj por la progreso de ilia ekonomio.

**Perspektivoj**

Ĉu la situacio iam ŝanĝiĝos? Milita atako per aliaj nacioj de Afriko por liberigi siajn nigrajn fratojn nuntempe estas pura utopio. Sudafriko militiste estas supera al ĉiuj aliaj afrikaj ŝtatoj, ja kun Portugal-Afriko kaj Rodezio supera al ĉia unuigita afrikana armeo. Milit-minacoj de najbaraj afrikanoj tial efikas ridinde. La militistaj kaj policaj fortoj pruvas ankaŭ ĉian internan revolucion malprudenta kaj fiaska.

Ŝanĝiĝo de la cirkonstancoj ĉefe povus estiĝi per la ekonomia evoluo. Kvankam oni konstante klopodis pri blankaj enmigrantoj, tamen neniam venis tiom multaj, ke oni povis kovri la bezonon de laboristoj, precipe de faklaboristoj. Tiel oni devas preni afrikanojn. Ju pli la afrikano integriĝas en la ekonomia vivo, des pli proksimen venas la tago de lia rajtigo. Aldoniĝas, ke dum la lastaj jaroj ankaŭ la nederland-reformita eklezio travivis kelkajn "konvertiĝojn" en la propraj vicoj ĉar ankaŭ ilia teologio ne povas resti ĉe tiu de la Malnova Testamento kun idealo de elektita popolo. Eble la timo kontraŭ biologia rasmiksiĝo ludas gravan rolon, la timo ke pereos la blanka raso en Sudafriko. Sed reciproka respekto kaj kunlaborado ne nepre devas konduki al rasmiksiĝo, se oni absolute ne volas tion.

# amas-rasismo

Antaŭ kelka tempo okazis sensacio en Alabamo/Usono, kie "blanka" tribunalo la unuan fojon en la landa historio kondamnis blankan murdinton, kiu elvivigis negron. Lia advokato ad-vokis "ve!" kaj diris: "Mi estas konsternita ke tribunalo formita el 12 tielnomataj blankuloj kondamnas honestan viron pro tia bagatelo." Por ke vi estu informitaj tutprecize: la "honesta viro" estis la murdinto kaj la "bagatelo" estis la negro-murdo!

Nu, tio estas nur unu ekzemplo el amaso da similaj ĉiutage okazantaj sub la marko "rasmalamo". Oni povas esti konsternita ke nur tiam la unuan fojon vere oni elparolis verdikton pri murdiĝo de negro per blankulo, sed eĉ pli oni povas konsterniĝi pri la konsterniĝo de la koncerna advokato — oni povas. Ĉu oni devas aŭ rajtas, jen la demando al vi, konscienca demando.

Germano, kiu restadis en multaj kolonioj, i.a. ankaŭ Britio, diris al mi: "Ne ekzistas momente pli ardaj german-malamantoj ol la angloj." Tion li ne diris malame, male. Gastlaboristoj en nia lando ne malpli plendas: ni ne trovas kontakton, oni ne volas nin ĉi tie, oni nur volas nian laborforton. Kaj kiu konas la situacion, devas hontkonsenti: la germanoj eble fariĝis malantisemitoj, sed samgrade ili nun trovas aliajn objektojn

**niaj humoristoj**

**Ruben Feldman Gonzales**

# EKZAMENOJ

Dum mia tuta vivo mi trapasis ekzamenojn.
Mi nur estas simpla, malriĉa, eĉ kompatinda medicin-studento kaj mi rajtas ĉefe nomi min tion lastan — kompatinda — kaŭze de la ekzamenoj. La diablo estas la kreinto de la ekzamenoj kaj li inventis ilin jam por la tre junaj homoj, celante laŭgradan idiotigon kaj detruon de la cerboj kaj de la koroj. Eble li (la diablo) iam ekkomprenis ke la homoj estas kuriozaj kaj eble pro tiu natura kuriozeco ili estus venintaj al granda kaj vera scio. Kiel forpeli do, rapide kaj por ĉiam, tiun sanktan kuriozecon? ... Per la ekzamenoj, kompreneble!
Jam de la plej frua juneco la homoj komencas sin prepari por la ekzamenoj, kiuj daŭras plimalpli ĝis la duono de ilaj vivoj. Multfoje pli ol tiu duono, tial ke la ekzamenoj sendube kontribuas mallongigi la vivon!
Ja, ne interrompu min dirante ke mi troigas. Bonvolu...
La ekzamenoj konsistigas veran malsanon kun difinitaj simptomoj. Demandu la ekzamenitojn. Ili certe pravigas min. Por tiuj, kiuj ŝatas detalojn, jen do la simptomoj:

- Kvar tagoj antaŭ la okazo: maldormo kaj korbategoj.
- Tri tagoj antaŭ la okazo: korbategoj kaj kapdoloroj.
- Du tagoj antaŭ la okazo: kapdoloro, grandaj ve-spiroj, korbategoj, kelkfoje febreto.
- Unu tago antaŭ la okazo: digestaparataj esprimoj, kiel baldaŭa satiĝo, seka buŝo, hepat-doloro kaj por fini — por fini ne nur mian detaligon, sed fini ankaŭ la deziron vivi — diareo ... Sed bonvolu ne ripeti tiun vorton al mia needzinta onklino, kiu estas ege hontema! Sed ja la diareo estas vere la plej grava fakto dum ekzamenepoko.

Mia amiko Armando perdis unu monaton, ĉar li ne povis diri "mi ĉeestas" kiam la profesoro legis la ekzamen-liston, ĉar li sidis ĝuste tiutempe en certa ejo. Alian fojon la ekzameno malfaciliĝis al li, ĉar li devis peti permeson dum sia parolado pri la elektrika aktiveco de la muskoloj.

Sed jam sufiĉas pri la digesta aspekto de la ekzamenoj. Estas multe, multe pliaj aspektoj, sed mi timas ne povi mencii ilin ĉiujn, ĉu pro forgeso, ĉu pro manko de kuraĝo.

Ekzemple la helpemo de la profesoroj. Eĉ tio malsukcesas dum ekzameno. Foje mia amiko Johano pruntepetis fontoplumon al la ekzamenanto. Li donis ĝin dirante: "Zorgu pri ĝi, ĉar estas Parker!" (Tio estas la plej valora marko)

Johano parolis, desegnis per tiu fontoplumo, lasis ĝin ĉe la tablorando, puŝis ĝin per sia kubuto — ĝi trafis la plankon pinte kaj restis tremante tie, tutsame kiel Johano mem antaŭ la profesoro

**rigardata kun germanaj okuloj**

de sia rasmalemo, se ne rasmalamo en pli vasta senco.

Kun indigniĝo ili parolas pri raskravaloj en Usono, sed samfraze ili ne razas tiel maljunajn barbojn kiel "malpuraj aĉitaloj" kaj "mallaboremaj sudeŭropanoj", kaj dum ili akre kritikas la sudafrikan apartheid-potitikon ili insultas pri la afrikaj popoloj, kiuj laŭdire amuzuzas nian evolu-monon, aŭ ridmokas pri la daŭraj revolucioj en junaj ŝtatoj, forgesante ke la propraj praavoj ne agis malpli ridinde.

Nu, pri tio oni kompreneble povus verki librojn, kio ne estas mia intenco. Mia intenco estas montri la tendencon. Kaj ĝi estas tia ke post mallonga tempo ni en Germania staros antaŭ la sama rasproblemo kiel hodiaŭ Usono, morgaŭ Britio, postmorgaŭ Nederlando kaj aliaj landoj de Okcident-Eŭropo. La rasoj fakte ne amasiĝas, sed en tiuj landoj jes. Se nun oni venigas jam koreanajn hospital-flegistinojn, ĉar germanaj mankas, baldaŭ ankaŭ mikskolora vizaĝaro estos kutima bildo ĉe ni, tiel ke eble eĉ niaj damoj kaj sportistinoj anstataŭ brunoleumi sin, paliĝos por rimarkigi ke ili estas germanoj kaj eŭropanoj. Ĉu ni vetu, ke baldaŭ ekestos prospera industrio produktanta blankig-kremon por garantii al nia "kremo" de la socio la blankec-aspekton? Kia pala estonteco...

Mefi(s)tofilo

gape rigardanta la plankon trapikitan per lia trezoro. Johano fiaskis — sed mi, kompreneble, tute ne intencas rilatigi tion al la antaŭdirita okazintaĵo.

Estas dubinde, ĉu la ekzamenoj utilas por eltrovi scion aŭ limigi la nombron de gelernantoj en pluraj lokoj. Ĉu ne ankaŭ vi kredas, ke la ekzamenoj ne estus necesaj, se profesoro kaj lernanto estus amikoj kaj interkomprenigus? Ĉu vi pensas, ke la ekzamenoj estus necesaj, se la profesoro konus sian lernanton kaj sian profesion? Ĉu vi vere estas konvinkitaj ke en nur unu horo ekzamena (kelkfoje multe malpli) oni povas eltrovi la scion aŭ kapablon de persono kiu studis kaj lernis dum tuta jaro? Kaj ni konsideru la diverspecajn kaj multnombrajn cirkonstancojn, kiuj ludas rolon en la momento de la domaĝaĵo nomita "ekzameno" kaj kiuj povas distri, forgesigi aŭ ĝeni la ekzamenaton. Kronikaj malsanoj povas akutiĝi pro la granda streĉo — ne nur psika, sed ankaŭ fizika — tra kiu paŝas la ekzamenoto.

Mi ja konsideras ekzamenojn granda tragedio, tiel granda ke preskaŭ ĉiuj homoj ĝin suferas, tiel kutima ke ni jam ne vidas ĝin vera tragedio kiu idiotigas nin almenaŭ iom, kiu detruas nian korpan sanon, nian honestecon kaj niajn dezirojn lerni el tiu nova kaj eferveska vivo . . .

**Simple**

Jurostudenton en la ekzameno la profesoro demandis: "Du virinoj naskas samtempe en la hospitalo knabojn. La akuŝistino erare interŝanĝis la bebojn. Kion oni povas fari?" La profesoro kompreneble atendis atentigon pri la ebleco de biologia esploro. Sed la studento sciis alian solvon de la problemo: "Mi simple denove interŝanĝus ilin."



# senpaga

Lastatempe eĉ en la t.n. kulturlandoj oni pli kaj pli ofte parolas pri mizera stato de la erudicio, pri neuzataj rezervoj, ja kelklande pri vera analfabetismo. La nuna tutmonda agado kontraŭ analfabetismo kompreneble direktas sin ĉefe al la neevoluintaj landoj, kie la situacio estas katastrofa. Sed pri tiu problemo ni skribos alian fojon. Hodiaŭ ni volas montri du ekzemplojn de kulturlandoj.

En Germanio ekzistas ankoraŭ pluraj regionoj, kie pro la sociaj kaj socialaj cirkonstancoj la infanoj tute ne havas ideon pri pli ampleksa edukiĝo kaj la gepatroj tute ne scias aŭ pensas pri la eblecoj, sendi siajn infanojn al mezaj kaj pli altaj lernejoj, kontentiĝante pri la elementa lernejo (kiu ja estas deviga). En unu el tiuj regionoj (Nigra Arbaro) manpleno da studentoj de la universitato Freiburg i.Br. iniciatis agadon kontraŭ tiu nescio. Ili iris dum siaj ferioj, unuope kaj grupe, en la vilaĝojn kaj klerigis la gepatrojn pri la edukeblecoj kaj la rezultaj profesi-eblecoj. La efiko estis ege miriga kaj ne atendita eĉ de la plej optimistaj. Oni trovis tiom da eduk-rezervoj en la vilaĝoj, ke oni devos verŝajne konstrui novajn mezgradajn lernejojn por la venontaj jaroj, se la studentoj daŭrigos agadon. Kaj ili kompreneble, post tia sukceco de la eksperimento, daŭrigos pli grandskale.

La dua ekzemplo venas el alia altevoluinta lando, Usono, kaj denove temas pri studentoj. En 1963 en la universitato de Ĉikago la nun 24jara studentino Ann Cook kaj la samaĝa doktoriĝanto Herbert Mack iniciatis helpagadon por la kvartalo Woodlawn, kie loĝas neriĉaj urbanoj. La studentoj disponigis sin por senpaga subtena instruado por helpi infanojn, kiuj pro iuj ajn kialoj ne bone progresis en la lernejoj, sed ne havis monon por pagi kromajn instruistojn. La sukceso estis preskaŭ mirakla, subteno kaj apogo de multaj flankoj venis, kaj nun la du iniciatintoj havas preskaŭ 400 idealistajn helpantojn. Iom post iom oni povis ampleksigi la programon per seminarioj, diskutrondoj, vizitoj de muzeoj kaj bibliotekoj ktp.
Jen do ekzemploj imitindaj kaj agadoj necesaj por multaj aliaj kulturlandoj, ĉar nescio signifas malricecon, sed ja ankaŭ inverse malriĉeco ne permesas eliron el nescio. La riĉaj — je rimedoj kaj scio — nur povas rompi la cirklon.

**75 000 000 ne povas legi**

La statistikoj estas oficialaj. Ili parolas pri la analfabetismo de 20 ŝtatoj sudamerikaj. Ĉa. 170 milionoj vivas en tiuj landoj. 75 milionoj el ili ne scias legi kaj skribi, tio estas 44 %. Jen la procentaĵoj laŭlande: Brazilo 50 %, Peruo 53, Honduras 60, Nigaraguo 65, Bolivio 67,9, Gvatemalo 70, Haito 89. Pli bone estas en Argentinio (11), Urugvajo (18), Ĉilio (19) kaj Costa Rica (21).

**Studentoj batalas kontraŭ analfabetismo**

# instruado



Fari la lernejajn hejmtaskojn kun la juna studentino estas pura ĝojo por la negra knabino el la Ĉikaga kvartalo Woodlawn. Kaj tio senpage! Nun ankaŭ ŝi povas akiri la necesajn kvalitojn por sukcese fini la lernejon.

# MOZAIKO

**Ĉu vi scias . . .**

ke la japanoj ne kutimas trinki freŝan lakton? Oni pulvorigas ĝin, el la pulvoro oni pretigas per akvo denove lakton. Oni nomas ĝin "mineral-lakto".
ke la vinon unue mencias la babilonaj leĝoj de Hammurapi (2000 a.Kr.)?
ke depost la invento de presado aperis ĉa. 50 milionoj libroj (titoloj)?
ke hodiaŭ ekzistas ĉa. 182 milionoj telefonoj en la tuta mondo?
ke en ĉiuj antikvaj romiaj lokoj la stratoj havis nomojn kaj ŝildojn? Ankaŭ ĉiuj gastejoj estis signitaj per ŝildoj.
ke haringo povas atingi aĝon de 25 jaroj, karpo kaj ezoko eĉ 100?

**Ratovostoj**

Kiel viglaj komercistoj montriĝis la infanoj de la franca urbo Plomodiern. Dum kelka tempo la urbon jam plagis amaso da rajtoj. Tial la urbestraro ofertis al ĉiu infano senpagan kinobileton por unu liverita ratovosto. Nun la kinejoj estas daŭre plenplenaj kaj la urbo havas pli multajn ratojn ol iam antaŭe. — La infanoj fervore bredas ratojn . . .

**Spirite**


"Mi bedaŭras, ke mi ne povos veni al via koncerto. Sed mi ĉeestos spirite." "Kie ŝatas sidi via spirito? Mi havas biletojn por 5 kaj 10 kronoj."

**Aŭdkapablo**

Mark Twain asertis, ke en la "bona societo" de Novjorko neniam unu homo aŭdas kion diras alia. Por pruvi tion, li foje venis kun duonhora malfruiĝo al akcepto kaj diris al la mastrino: "Pardonu, ke mi venas tiel malfrue, sed mi devis ankoraŭ murdi mian servistinon, kaj tio daŭris pli longe, ol mi planis." "Sed ja ne gravas", ridetante la damo, "ĉefaĵo estas ke vi tamen venis."

**Hundo kaj valizo**

Paŭlo vizitis sian onklon. Alveninte, kun la valizo en la mano li iris en la korton; subite furioza hundo, ligita per longa kateno, kuris bojegante kontraŭ lin. Per akrobata salto Paŭlo savis sin, sed kaŭze de la timiga surprizo li faligis la valizon, kiu nun kuŝis proksime de arbo en la "hunda regiono". Paŭlo vokis, sed neniu en la domo aŭdis lin. Nur la hundo malame bojis. Se li almenaŭ rehavus sian valizon! Paŭlo pripensis la aferon — kaj jen trovis tre simplan solvon. Ĉu vi ankaŭ trovas ĝin?




EUROPAJ TRAFIKSILDOJ

Supraj trafik-ŝildoj estas internaciaj kaj validaj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. (Grizaz koloro reale estas ruĝa, nigra reale estas blua). Jen ilia signifo: 1. Nur por motor-veturiloj 2. Aŭtovojo 3. Fino de aŭtovojo 4. Ne-traira strato 5. Malpermese halti 6. Malpermeso parki 7. Malpermeso por kamionoj preterpasi 8. Haltu! Atentu antaŭrangon! 9. Cirkla strato 10. Atentu, ŝtonfalado 11. Eniranta strato duaranga 12. Kruciĝo kun duaranga strato 13. Malpermeso turniĝi dekstren 14. Malpermeso returniĝi 15. Duobla kurbo 16. Dekstren-kurbo 17. Minimuma rapideco 18. Fino de malpermeso preterpasi 19. Unudirekta strato 20. Kampadejo.

# Perantoj de KONTAKTO

**Argentino:** s-ro J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, OLIVOS (330 pesoj)
**Aŭstralio:** s-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, MELBOURNE, Vic.
**Aŭstrio:** s-ro F. W. Rentmeister, A 1150 WIEN XV/101, Kauergasse 1/1 St. 2, Stg. 15 (58,— Sch.)
**Belgio:** s-ro François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, ANTWERPEN (115 b.fr.)
**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, RIO DE JANEIRO (3400 kruz.)
**Britujo:** Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11 (16/— ŝil.)
**Bulgario:** s-ro Simeon Simeonov, G. Genov 22, SOFIA-C (2,— lv.)
**Ĉeĥoslovakio:** s-ro Egon Moravec, U družstva Ideál 11, PRAHA 4-Pankrác (32 Kčs)
**Danlando:** s-ro Arne Kolle, Østergade 22, HALS
**Finlando:** s-ro Joel Vilkki, SOMERO (7,10 f.mk.)
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, PARIS 10 (11 NF)
**Germanio (FRG):** s-ro Reinhard Haupenthal, 6603 SULZBACH 1, Am Bahndamm 12 (8,90 g.mk.)
**Germanio (GDR):** s-ro Hans Eichhorn, 83 PIRNA, Großsedlitzer Str. 54 (8,90 MDN)
**Greklando:** s-ro S. Sakellaropulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, ATHINE (66 dr)
**Hispanio:** s-ro R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, MOYA, Barcelona (135 pes.)
**Hungario:** Hungara Esperanto-Junularo, Kenyérmezö u. 6, BUDAPEST VIII (52,— ft.)
**Irlando:** s-ro J. Addis, Kingston House, Ballinteer, DUBLIN 14 (16/— ŝil)
**Islando:** Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, REYKJAVIK (93,— i.kr.)
**Israelo:** s-ro J. Ben Alter, P.O.B. 379, PETAH TIKVA (6,70 isr.pd)
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1400 lr.)
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyô-ku, TOKIO (800 enoj)
**Jugoslavio:** s-ino Emilja Lapenna, Nova Ves 32/III, ZAGREB (2000 din.)
**Kanado:** s-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., TORONTO 7, Ont. (2,40 dol.)
**Kongo:** Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, KINSHASA
**Koreo Suda:** s-ro Taekeng Kim, Seoul Myoung-Ji College, SEOUL
**Madagaskaro:** s-ro Eugène Raveloson, B.P. 1678, TANANARIVE (300 f.mg.)
**Maroko:** s-ro René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, RABAT (11 DH)
**Meksikio:** s-ro F. Azorin, Str. Guadalquivir 41-E, MEXICO 5 D.F. (28,- pesoj)
**Nederlando:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (8,— gld.)
**Norvegio:** s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, OSLO-Bryn 16,— n.kr.)
**Novzelando:** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 40-181, UPPER HUTT (16/— ŝil.)
**Pollando:** s-ro Marek W. Pietrzak, ul. Francuska 5a/3, WARSZAWA (55 zl.)
**Portugalio:** s-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., LISBOA (4,— esk.)
**Rumanio:** s-ro Florin Caragea, Popa Petre 28, BUCURESTI-9 (32 lejoj)
**Sovetunio:** s-ro A. E. Gonĉarov, p.k. 11. BARNAUL 99 (2,50 rbl.)
**Sudafriko:** s-ro Colin Beckford, P.O. Box 10516, JOHANNESBURG (1,60 rnd.)
**Svedio:** Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, MALMÖ (11,50 s.kr.)
**Svislando:** s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 ROMANSHORN (9,70 s.fr.)
**Urugvajo:** d-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Florida) (50,- pesoj)
**Usono:** s-ro D. E. Parrish, 328 West 46 St., LOS ANGELES, Calif. 90037 (2,25 dol.)
**Venezuelo:** s-ro L. Moulines, Apartado del Este 4845, CARACAS (10,— bol.)

**ESTRARO DE T.E.J.O.**

**Ivo Osibov**, prezidanto, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio
**Humphrey Tonkin**, ĝenerala sekretario, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono
**Roman Dobrzyński**, vicprezidanto, organizaj demandoj, ul. Garwolińska 14/64, Warszawa-44, Pollando
**Ulrich Lins**, vicprezidanto, regiona agado, "Kontakto"; Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio
**Vilmos Benczik**, kasisto, Emilia u. 23, Budapest XIV., Hungario
**Hans Bakker**, eksteraj rilatoj, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando
**Dimitr Ĵdrakov**, kulturaj aferoj; p.k. 1361, Sofia-C, Bulgario
**Andrzej Pettyn**, lernejaj aferoj; ul. Kościuszki 24, Milanówek k/W-wy, Pollando
**Yoshimi Umeda**, studentaj aferoj, agado en Azio kaj Oceanio; ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanio

**LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.**

ARGENTINO:
Ruben Feldman Gonzalez, Bv. Oroño 866, Dpto. A, Rosario
AŬSTRALIO:
Daniel Kane, 5/55 Hardĉick street, North Melbourne
AŬSTRIO:
Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz
BELGIO:
Serge Denoel, rue Victor Raskin 20, Liège
BRITIO:
Peter Kelton Groves, 2 Edwina Gardens, Ilford, Essex
ĈEĤOSLOVAKIO:
Blanická 4, Praha 2
FRANCIO:
JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X
GERMANIO:
U.J. Moritz, Hafenstr. 75, 44 Münster
HISPANIO:
Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona
HUNGARIO:
Kenyérmezö u. 6, Budapest VIII
ITALIO:
Via Po, 7, Torino
JAPANIO:
Hongo 2-2-14, Bunkyô, Tokio
JUGOSLAVIO:
Dobrinjska 12, Beograd
KOREO:
Taekeng Kim, Seoul Myoung-Ji College, Seoul
MADAGASKARO:
B.P. 1678, Tananarive
NEDERLANDO:
Robert Groeneveld, Makassarstr. 112, Amsterdam-6
NORDAMERIKO:
Jonathan Pool, 377 International House 1414 E.59 St., Chicago, Ill. 60637
NOVZELANDO:
P.O. Box 181, Upper Hutt
POLLANDO:
ul. Nowy Swiat 27, Warszawa
SVEDIO:
Ingrid Calrsson, Lindbergsgatan 4, Sundsvall
SVISLANDO:
Tazio Carlevaro, Viale Stazione 23, 6500 Bellinzona

KOLEKTU LA ELDONSERION

# ORIENTO-OKCIDENTO

**eldonatan sub aŭspicio de UEA**

## LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO,** sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.

2. **RAKONTOJ DE OOGAI,** kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyôdayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.

3. **LA NAŬZO,** eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.

4. **KALEVALA,** la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.

5. **MARTÍN FIERRO,** iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rimversa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.

6. **REĜO LEAR,** unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.

7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO,** de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

**LA DIA KOMEDIO,** de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

**Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj**

**Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.**

**Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando**


16183